INTORMA BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
JANUARO - FEBRUARO 1963

Numero 1 /63/

Ano 1 Santander, Julio 1902 Num. 5

Por kroniko de via organo mi devas komuniki, ke la bohemaj esperantistoj intencas en la fino de l´jaro eldoni monatan revuon. En Prago fondiĝis klubo esperantista. Por rimedoj de unu germano anonima s-ro Čejka eldonis belan broŝuron "Letero pri deveno de Esperanto" kun versaĵo "Mia penso", kiu broŝuro estos senpage dissendita po cent ekzempleroj al ĉiuj esperantaj kluboj.

Ivan O. Seleznjev /Juan Seleznjov/

Tio ĉi estas la plej unua eksterlanda informo pri esperantistoj en Praha. Ĝi sciigas al la legantaro de hispana bulteno „Esperanto", ke en Praha, en tiama Aŭstrio-Hungario, jam ekzistas Esperantista klubo. Tiu ĉi informo aperis en Hispanio jam en julio 1902, sed nur la 9-an de decembro 1902 estis en Praha fondita „esperantista klubo en Praha" kun 25 geklubanoj. Bedaŭrinde mankas pli detalaj dokumentoj el tiuj tagoj, sed tiuj, kiuj estas en nia arkivo je dispono, dokumentas, ke la unuaj jaroj, dank' al vervoplenaj samideanoj estis sukcesaj. Tio daŭris ĝis la unua mondmilito, kaj tuj post ĝi denove ekfloris la kluba vivo, ke jam en la jaro 1921 en kunlaboro kun aliaj esperantistaj kluboj en Ĉeĥoslovakio povis nia ĉefurbo gastigi la XlII-an Universalan kongreson de Esperanto kun 2561 partoprenintoj. Tiu ĉi kluba prospero
daŭrigis ĝis la jaro 1939, kiam ekkomencis la nazi-okupacio. La plej trista kluba tago estis tiu aŭtuna en la jaro 1944, kiam venis ordono tuj likvidi la klubon.

Sed kiam en la jaro 1945 Ruĝa armeo liberigis Ĉeĥoslovakion, anoncis la klubo daŭrigon de sia agado. Denove venadis sukcesoj eĉ malsukcesoj kaj tion ĉion ni rememoriĝis, kiam en decembro 1962 ni festis en Malgranda salono de Urba biblioteko la 60-an jubilieon de nia klubo.

Depost la fondo de Esperantista klubo en Praha multo ŝanĝiĝis. Sed nia celo restis tiu sama: helpe de Internacia lingvo servi al la homaro, servi al paco.

Kaj ni volas resti indaj de glora historio de

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA.

-----------------------------------------------

## NIA KLUBO EN LA JARO 1962

Esperantista klubo en Praha laboras kiel fakrondo de Regiona kultura domo en Praha 1 kaj ĝi havis en la jaro 1962 24-0 anojn.Efektivigis 51 klubaj kun- venoj kun entute 1376 ĉeestintoj. El aliaj urboj en ĉefioslovakio vizitis nin 168 samideanoj, el eksterlando venis 57 gastoj. Multajn aliajn eksterlandajn gastojn ni bonvenigis en nia kluba bibliotéko en Praha 1, Týnská 3, aú ni renkontiĝis kun ili aliloke.

Klubaj kunvenoj okazis en kunvenejo en Praha l,Ve Smečkách 26 ciumerkrede kaj tie ankaŭ okazis kursoj por komenoantoj kaj por progresintoj.

Kauzo, ke en lingvaj kursoj estis nuraj 26 lernantoj,estis malgranda propagando kaj eĉ tio, ke ne estis taŭga ejo, apartigita de klubejo.

Klubaj programoj estis sufiĉe riĉaj kaj krom normalaj informoj pri orga- nizaj aferoj okazis 20 prelegoj /kelkaj el ili kun lumbildoj au filmoj/ 12 grandaj aktualaĵoj kaj 10 literare-muzikaj kompilaĵoj.

Kiel eksterordinara programo estis solena kunveno ok&ze de 60-a kluba jubileo.

Agrabla estis tiu vespero, kiam niajn samideanojn vizitis okaze de la In- ternacia virina tágo 29 pionirinoj kunbelaj donacoj.

La 5-an de decembro rezignis ĝisnuna prezidanto s-ano Marik kaj gis jar- fino gvidis klubajn aferojn s-ano Slanina.

Statistikaj raportoj:

| | |
|---|---|
| membroj ........................ | 240 |
| gastoj el Cehoslovakio ......... | 168 |
| gastoj el eksterlando .......... | 57 |
| prelegoj ....,............... | 20 |
| grandaj aktualajoj ............ | 12 |
| klubaj kunvenoj ................ | 51 |
| eksterordinara kunveno .......... | 1 |
| liter-muzikaj programoj ...... | 10 |

Eksterlandaj gastoj venis el 10 landoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Anglujo ......................... | 4 | Jugoslavio... | 2 |
| Bulgario ......................... | 7 | Nederlando'................ | 7 |
| Danujo .......................... | 4 | Germana Demokrata Respubliko | 2 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Finnlando.................... 1 | | Pollando ................ | 22 |
| Hungarujo ...................... 4 | | Svedujo.......... | |

K L U B A J NOVAĴOJ

NOVA PREZIDANTO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

Rezignanta laborkomitato de nia klubo proponis al la geklubanoj kiel novan prezidanton samideanon Miloš Rudo1f, longjaran funkciulon de esperantista movado en Ĉeĥoslovakio.

La 9-an de januaro 1963 estis la propono akceptita kaj la nova prezidanto prenis sur sin la zorgojn pri nia klubo.

NIA NOVA KORESPONDADRESO

Ek de la 1-a de februaro estas je dispono de nia klubo poŝtkesto ĉe la ĉefa poŝta oficejo en Praha.
Tial adresu la korespondadon:
"ESPERANTO", poŝtkesto 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

"INFORMA BULTENO"

de Esperantista klubo en Praha aperados en 1963 pli ofte ol en la pasinta jaro kaj ĝi enhavos novaĵojn el nia kluba vivo, el Ĉeĥoslovakio kaj el eksterlando. Krome ĝi enhavos regulajn rubrikojn: "GRAMATIKO", "KORESPONDANTO" kaj "INTERESAĴOJ".

Tiuj, kiuj volas ricevadi nian "Informan Bultenon", skribu tuj al nia nova adreso: "ESPERANTO", poŝtkesto numero 1108, Praha 1. Abonpago por 1963 estas Kčs 7,-.

Ĉeĥoslovakaj eĉ eksterlandaj interesuloj povas senpage uzadi la rubrikon "KORESPONDANTO", se ili serĉas korespondantojn aŭ se ili havos ion interesan. Eluzu tiun ĉi eblecon.

NOVA KLUBEJO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

La nova kunvenejo de nia klubo, kiu estas moderne mebligita, ebligos al ni dum la programoj projekcii filmojn, lumbildojn, aŭskulti radion au programojn el magnetofonaj sonbendoj. En unu el ĝiaj ejoj ni aranĝos kursojn.
Malbonaj spertoj el la pasinta jaro instigas nin, ke ni la kursojn bone propagandu kaj samtempe, ke ni multe pli dediĉu nin al la gekursanoj. Ne sufiĉos nura instruado de gramatiko kaj tradukoj de lernejaj artikoletoj.
Kiam nin la instruisto informos, ke liaj gekursanoj jam posedas scion de lingva bazo, ili partoprenados eĉ niajn regulajn kunvenojn, kies programoj certe kompletigos al ili jam atingitajn konojn. Kaj kompreneble, ke de instruistoj ni postulos la plej bonan kvaliton, sed jam hodiaŭ ni povas diri, ke ili estas bonkvalitaj. Do ĉiuj kondiĉoj estas favoraj kaj tial ni kredas, ke en kunlaboro kun RKD /OKD/ oni baldaŭ povos diri, ke nia klubo estas modela.

A T E N T U !

La 22-an de februaro ni kunvenis la unuan fojon en nia nova klubejo en Praha 1, Řeznická 17 /Řeznická strato 17/*

Ek de tiu ĉi datumo ni kunvenadas ĉiuvendrede vespere kaj ni esperas, ke ankaŭ vin ni povos bonvenigi en nia nova klubejo.

T i a l n e f o r g e s u !

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA, korespondadreso: "ESPERANTO", poŝtkesto 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio, kunvenadas ĉiuvendrede /19.30-22.00/ en nova klubejo en Praha 1, Řeznická strato 17. /Represo dezirata/

OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE VIRINOJ

Jan Neruda /1834-1891/ — tradukis Miloš Lukáš

AL LA PATRINETO /1868/

Ĉiun senton nur silente
portas mi en mia koro,
eĉ la panjon mi sciigas
nek pri ĝoj´ nek pri doloro.

Kio kaŭzas, mia panjo,
ke vi tamen ĉion vidas -
kiam ĝojas mia koro,
ke okuloj viaj ridas?

Kio kauzas, mia panjo,
ke vi ĉion klare vidas,
kiam ploras mia koro,
ke vi en angul´eksidas?

KORESPONDANTO

= Vietnama esperantista grupo dezjras korespondi kaj interŝanĝi kun ĉiuj landoj spertojn. Skribu al: Nguyén-Ngoc -Toan,Nr.228, sta Lo Duc,Hanoi, Vietnamio.

= Gekursanoj el Praha deziras ekkorespondadi. Skribu al: "ESPERANTO", poŝtkesto 1108, Praha 1, Ĉehĥoslovakio.

= Du studentoj: A.S.MARJENKO, Ĥarkovskaja 2.kv.51, Dnjepropetrovsk 30 kaj G.J.SEVCENKO, K.Liebknechta 15,kv.32, Dnjepropetrovsk,Sovetunio,deziras interŝanĝi neuzitajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn, gazetojn, alumetetikedojn.
= ZK ROH-TEXTILANA, n. p.,Esperanto - rondeto, Nové Město p.Smrkem, okr.Liberec, Ĉeĥoslovakio, interesiĝas pri kolektiva kaj individua korespondado pri diversaj temoj, speciale kun Uzbeka SSR.

AL NIA LEGANTARO

Ek de tiu ĉi eldono de "Informa Bulteno" ni sendados la aperontajn numerojn nur al tiuj interesuloj, kiuj ĝis la 15-a de aprilo 1963 ilin abonpagos. Abonpagojn /Kčs 7»-/ sendu aŭ pere de poŝtpagilo aŭ al la adreso: "ESPERANTO", poŝtkesto 1108, Praha 1.
Venontfoje ricevados nian "Informan Bultenon" senpage nur eksterlandaj redakcioj, radiostacioj kaj asocioj, kiuj pri ĝi havos intereson, escepte de C.E.D., C.O. kaj I.E.M.W., kiuj ricevados ĉiujn numerojn regule.
Do kiu interesiĝas pri nia "Informa Bulteno", skribu tuj al nia klubo.

ĈU VI INTENCAS VIZITI Ĉeĥoslovakion?

Informiĝu ĉe ĈSEK, Blanická 4, Praha 2. Vi ricevos interesan broŝuron pri Ĉeĥoslovakio.

RADIO PRAHA PRI ESPERANTO
EN ESPERANTO

Dum la jaro 1962 disaŭdigis Radio Praha l5-foje pri Esperanto en Esperanto. Interesuloj el eksterlando skribu al: Radio Praha, Vinohradská třída 12, Praha, Ĉeĥoslovakio, kun rimarko: "ESPERANTO".

---

"INFORMA BULTENO" de fakrondeto de Esperantista klubo en Praha ĉe Obvodní kulturní dům ONV 1, Praha 1. Respondeca: Miloš Rudolf, Aperas laúbezone. Adreso: "ESPERANTO", poŝtkesto 1106, Praha 1, Ĉeĥoslovakio